

Paul Gerhardt,

Transdonu vian
vojon*tradukita de Hendrik Arie
de Hoog*

1. Transdonu vian vojon,
la zorgojn de la kor',
turmentojn aŭ malĝojn
al Dio, la Sinjor'!
La mondon Li ja movas.
La vent' obias Lin,
por nub' Li vojon trovas;
ĉu Li ne gvidus vin?

2. Al l' Eternulo fidu
en pen' aŭ en esper';
Li viajn agojn gvidu
kaj certas la prosper'.
Se homo nur lamentas
pri sia sort' sen fin',
lin Dio ne atentis,
nur preg' atingas Lin.

3.
.....
.....
.....
.....
.....
.....
.....

4. La vojon vian ame
elektas Li; tra bon'
aŭ tra suferoj same.
Li gvidos laŭ bezon'.
Nenio Lin retenas,
ĉar venkas Lia grac'.
Li siajn idojn benas
per amo, fido, pac'.

...

Paul Gerhardt,

Translasu ĉion, kio

*tradukita de Manfredo Ratisla-
vo*

1. Translasu ĉion, kio
Vin premas en la kor'
Al nia kara Dio,
Foriĝos la dolor'.
La patro, kiu movas
La nubojn super ni,
Li certe vojon trovas,
Sur kiu iros vi.

2. Al Dio vi nur fidu,
Kaj bone fartos vi ;
Sur Lian verkon vidu,
Miriga estas ĝi.
Vi ne devigos Dion,
Eĉ se vi streĉas vin;
Atingos vi nenion,
Se vi ne petas Lin.

3. Ho patro, kio bonas
Por nia hom-natur',
Vi certe tion konas,
Ni kredu tion nur.
Kaj kiun Vi elektas,
Kreskigas Vi fortul',
Kaj tiun Vi protektas,
Ho saĝa Eternul'.

4. Ne mankas al vi vojo,
Kaj ne la rimedat' ;
Ja estas por ni ĝojo
Kaj beno Via far'.
Labor' kaj verko Via
Tre gravas ja por ni ;
Ho kara patro nia,
Ne devas halti ĝi.

...

Paul Gerhardt,

Befiehl du deine Wege

1. Befiehl du deine Wege,
Und was dein Herze kränkt,
Der allertreusten Pflege
Des, der den Himmel lenkt!
Der Wolken, Luft und Winden,
Gibt Wege, Lauf und Bahn,
Der wird auch Wege finden,
Da dein Fuß gehen kann.

2. Dem Herren mußst du trauen,
Wenn dir's soll wohlergehn;
Auf sein Werk must du schauen,
Wenn dein Werk soll bestehn.
Mit Sorgen und mit Grämen
Und mit selbsteigner Pein
Läßt Gott sich gar nichts nehmen,
Es muß erbeten sein.

3. Dein' ew'ge Treu' und Gnade,
O Vater, weiß und sieht,
Was gut sei oder schade
Dem sterblichen Geblüt;
Und was du dann erlesen,
Das treibst du, starker Held,
Und bringst zum Stand und Wesen,
Was deinem Rat gefällt.

4. Weg' hast du allerwegen,
An Mitteln fehlt dir's nicht;
Dein Tun ist lauter Segen,
Dein Gang ist lauter Licht,
Dein Werk kann niemand hindern,
Dein' Arbeit darf nicht ruhn,
Wenn du, was deinen Kindern
Ersprößlich ist, willst tun.

...

5.	5. Kaj kvankam kontraŭstaras Diabloj tie ĉi, Sendube Dio faras Nur kiel volas Li. Jes, kion Li planadas Kaj kion volas Li, Finfine ja venadas Alcele tio ĉi.	5. Und ob gleich alle Teufel Hier wollten widerstehn, So wird doch ohne Zweifel Gott nicht zurückegehn; Was er sich vorgenommen, Und was er haben will, Das muß doch endlich kommen Zu seinem Zweck und Ziel.
6. Kaj fidu Lin, animo, ĉar vin ja tiros Li, eĉ el plej granda timo kaj ĉiam miros vi, se krede vi atendos, ĝis Li en sia hor' por via help' descendos kaj brilo Lia glor'.	6. Esperu, ho animo, Ne malesperu vi, Restadu vi sen timo, Gvidadas vin ja Di'. Se vin malbon' insidos, Ne iru de la voj', Vi certe iam vidos La sunon de la ĝoj'.	6. Hoff, o du arme Seele, Hoff und sei unverzagt! Gott wird dich aus der Höhle, Da dich der Kummer plagt, Mit großen Gnaden rücken; Erwarte nur die Zeit, So wirst du schon erblicken Die Sonn' der schönsten Freud'.
7.	7. Nun bonan nokton diru Al zorgo kaj dolor'! Ĝin lasu, ĝi foriru Por ĉiam el la kor'! Vi ne konduki ĉion, Ne zorgu por la bon'! Vi lasu regi Dion. Li sidas sur la tron'.	7. Auf, auf, gib deinem Schmerze Und Sorgen gute Nacht! Laß fahren, was dein Herze Betrübt und traurig macht! Bist du doch nicht Regente Der alles führen soll; Gott sitzt im Regimente Und führet alles wohl.
8. Kaj kredu, ke Li reĝas eĉ kontraŭ falsa ŝajn'. Se vi persiste preĝas, Li helpas iel ajn. Ne kredu, ke vi devos droniĝi en labor' senfina; ne, Li levos vin al la patra kor'.	8. Lin, Lin nur lasu fari! Li estas saĝa reg'. Vi devas mire stari Adore kaj en preĝ'. Ĉar Li laŭ Sia deco Ĝin gvidos al la fin', Kaj la kor-premiteco Lasinta estos vin.	8. Ihn, ihn laß tun und walten, Er ist ein weiser Fürst Und wird sich so verhalten, Daß du dich wundern wirst, Wenn er, wie ihm gebühret, Mit wunderbarem Rat Die Sach' hinausgeführt, Die dich bekümmert hat.
9.	9. Li eble atendigos Dum kelka tempa vin, Kaj eble Li ŝajnigos Indiferenta Sin. Kaj ŝajnos, kvazaŭ volos Li ne plu savi vin, Neniam vin konsolos, Retiros de vi Sin.	9. Er wird zwar eine Weile Mit seinem Trost verziehn Und tun an seinem Teile, Als hätt' in seinem Sinn Er deiner sich begeben, Und sollt'st du für und für In Angst und Nöten schweben, Frag' er doch nichts nach dir.
...

- | | | |
|--|--|---|
| <p>10.

</p> | <p>10. Sed se fidele restos
 Vi al la patra Di',
 Savita de Li estos
 Neatendite vi.
 Se malgraŭ senkulpeco
 Suferi devas vi,
 De l' peza ŝargiteco
 Vin liberigos Li.</p> | <p>10. Wird's aber sich befinden,
 Daß du ihm treu verbleibst
 So wird er dich entbinden,
 Da du's am mind'sten gläubst;
 Er wird dein Herze lösen
 Von der so schweren Last,
 Die du zu keinem Bösen
 Bisher getragen hast.</p> |
| <p>11.

</p> | <p>11. Ho ĝoju, fidelulo!
 Donita de l' Sinjor'
 Ja estas al piulo,
 Al vi la venka glor'.
 Folion de la palmo
 Mem donos Li al vi;
 Vi kantos laŭ la psalmo,
 Dankante nur al Li.</p> | <p>11. Wohl dir, du Kind der Treue!
 Du hast und trägst davon
 Mit Ruhm und Dankgeschreie
 Den Sieg und Ehrenkron'.
 Gott gibt dir selbst die Palmen
 In deine rechte Hand,
 Und du singst Freudensalmen
 Dem, der dein Leid gewandt.</p> |
| <p>12. Li faros vian vojon
 plej luma en la fin',
 preparos por vi ĝojon
 kaj feliĉigos vin.
 Jam sonas laŭdo-psalmoj,
 jam vokas vin la cel',
 jam logas vin la palmoj,
 ĉe l' pordo de l' ĉiel'.</p> | <p>12. Ho, lasu esti fino
 De nia mizereg',
 En via patra sino,
 Eĉ malgraŭ sufereg',
 Restadas ni surtere
 Kaj post la vivo-fin'
 Ĉe Vi ni estos vere;
 Vi ja akceptos nin.</p> | <p>12. Mach End', o Herr, mach Ende
 An aller unsrer Not,
 Stärk unsre Füß' und Hände
 Und laß bis in den Tod
 Uns allzeit deiner Pflege
 Und Treu' empfohlen sein,
 So gehen unsre Wege
 Gewiß zum Himmel ein.</p> |

*Traduko de la Germana poemo "Befiehl du deine Wege" de PAUL GERHARDT (*1607-03-12 - †1676-05-27) en Esperanton de HENDRIK ARIE DE HOOG (*1910 - †2001) en 1954.*

Arg-546-1100 (2013-07-17 21:48:20)

Tiu ĉi traduko troviĝas en la ekumena eklezia kant-libro "Adoru", n-ro 744. Pri la tradukinto, la nederlanda esperantisto H. A. de Hoog, estas notita io en la vikipedia retejo http://eo.wikipedia.org/wiki/Hendrik_Arie_de_Hoog.

*Traduko de la Germana poemo "Befiehl du deine Wege" de PAUL GERHARDT (*1607-03-12 - †1676-05-27) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04).*

Arg-546-1098 (2010-07-03 14:37:37)

La unuan, la duan kaj la kvinan strofojn mi, Manfred Retzlaff, korektis laŭ konsiloj de s-ro pastro Albrecht Kronenberger [Albrecht.Kronenberger@t-online.de].

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas PAUL GERHARDT (*1607-03-12 - †1676-05-27), publikigita 1653.*

Arg-546-1096 (2010-06-24 22:02:56)

Pri la verkinto vidu la vikipedian retejon http://de.wikipedia.org/wiki/Paul_Gerhardt. La teksto troviĝas en la germana evangelia eklezia kantlibro sub la numero 294. La melodion verkis Bartholomäus Gesius en 1603. La tekston mi, Manfred Retzlaff, prenis el <http://www.musicanet.org/robokopp/Lieder/befiehl.d.html>.